Studsabatoj en CDELI

Malkovro kaj studo de *ESPERANTO, la internacia lingvo*

Kiam oni studas tute sole esperanton, aŭ partoprenante kursojn, oni necese sentas bezonon praktiki la lingvon sub la gvido de atentaj pedagogoj. Por plenumi tiun bezonon la ***Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI)****, fako de la Urba Biblioteko de La Chaux-de-Fonds, regule organizas praktikajn studsabatojn malfermitaj por ĉiuj. Ili estis organizitaj de Claude GACOND dum jardekoj kaj estas gvidataj aktuale de Mónika MOLNÁR, Nancy FONTANNAZ, Luc ALLEMAND, Nicole MARGOT, Stefano KELLER - kun la helpo de Danielle CARRIER.*

Datoj de la venontaj sabatoj

2023:
Februaro 18 - Marto 18 - Aprilo 29 - Majo 13 - Junio 17
Septembro 9 - Oktobro 21 - Novembro 18 - Decembro 16
3 studgrupoj*: tutkomencantoj, progresantoj, supera nivelo.*

Partopren-kotizo

Po 15 svisaj frankoj por studsabato (senpage por studantoj).

Aliĝo

Por faciligi la organizon de la renkontiĝoj la partoprenontoj b o n v o l u anonci sin ĝis la antaŭa mardo, indikante siajn nomon, adreson kaj telefonnumeron,
skribante rete al: esperanto@cdeli.org aŭ telefonante al: 021 728 31 27 (kun respondilo).

Horaro de la sabatoj

10.00: Malfermo de la salono de CDELI:
Eblas aĉeti novajn librojn : lernolibrojn, vortarojn, beletraĵojn, ktp, kaj tre malkostajn brokantaĵojn.

10.20: Oficiala malfermo kaj formo de la studgrupoj.

10.30: Unua studperiodo. Ĝenerale oni laboras en la salono de CDELI kaj en apudaj salonoj, kiujn la lernejo disponigas al ni.

11.30: Kafo-paŭzo.

11.45: Dua studperiodo.

12.45: Paŭzo por kune tagmanĝi en proksima restoracio. Ĉiu surloke pagas sian manĝon.

14.15: Tria studperiodo.

15.15: Te-paŭzo.

15.30: Kvara studperiodo.

16.30: Konkludo de la renkontiĝo en la salono de CDELI, kie eblas resti por babili teumante, kaj por aĉeti librojn, ĝis sia propra forirhoro.

17.30: Oficiala fermo.

CDELI-enirejo: Centra pordo norde de la domo de la Biblioteko (Progrès 33). Se la pordo estas fermita, sonorigu (CDELI-sonorilo): iu venos malfermi. Supreniru ĝis la 2a etaĝo.

Por atingi la Bibliotekon

La Biblioteko troviĝas ĉe la numero 33 de la strato Progrès.
El la stacidomo ĝi atingeblas per la buso n-ro 304, direkto “Hôpital”.
Petu la halton "Bibliothèque". Aŭtomobilistoj sekvu la ŝildojn vojmontrantajn "Bibliothèque".
Bv. parki vian aŭtomobilon en la stratoj de la kvartalo, ne en la korto.

Ni ĝojos vin renkonti kaj helpi vin praktiki Esperanton.
Mónika Molnár, Nancy Fontannaz, Luc Allemand, Nicole Margot, Stefano Keller, Danielle Carrier.

CDELI, Bibliothèque de la Ville, Strato Progrès 33, CH-2301 La Chaux-de-Fonds (NE), Svislando.
Telefono: +41 32 967 68 42
https://www.cdeli.org *Eldono: 2023-01-21, Stefano Keller*